

Invitilo al programo de Esperantista klubo Brno

Ni kore invitas vin al sekva programo de Esperantista klubo Brno

Temo

Polenantoj

Preparas: Oldřich Arnošt Fischer

Polenantoj estas organismoj, kiuj transmisias polenon sur stigmojn de floroj de granda grupo de plantoj-angiospermoj. Sen polenado plimulto da plantoj donus nek fruktojn nek semojn.

La plej multenombra grupo de polenantoj estas insektoj, sed la polenon kapablas transmisii ankaŭ kelkaj moluskoj (limakoj), rampuloj (lacertoj), birdoj (kolibroj) kaj mambestoj (marsupialoj, kiropteroj kaj primatoj, inkluzive de homo).

Rilatoj inter plantoj kaj iliaj polenantoj evoluas jam minimume 110 milionojn da jaroj.

La plej perfektaj polenantoj estas abeloj, kiuj havas interesan sistemon, pere de kiu ili informas pri fontoj de poleno kaj nektaro kaj ilaj distancoj de abelujo.

Sed kiu polenas figojn, kies floraroj estas preskaŭ fermitaj kaj donas neniun nektaron?

Ĉu ekzistas ŝtelistoj de nektaro? Ĉu floroj kapablas trompi insektojn?

Kiel ni povas al la polenantoj helpi.

La prelegon akompanas la fotoj, kiujn aŭtoro faris dum siaj ekskursoj.

Ĉeestas programo, ne estos elsendata rete. Ĝi estas registrita.

Lingvo: Esperanto

Kiam: la 5-an de oktobro 2022 je la 18-a h. (La klubejo estos malfermita ekde 17.45)

Kie: Občanský klub, [Hybešova 65a](#), Brno. La klubejo ne estas en ĉefa parto de strato Hybešova, sed en mallonga sakstrato. Rigardu la [mapon](#). La plej proksima tramhaltejo estas Václavská (linioj 1 kaj 2 el ĉefa stacidomo)



Cetera programo en oktobro

La 12-an **Milita stato en Pollando 1981–1983 per miaj okuloj** – rememoroj, komuna renkontiĝo kun PEA Gliwice, *rete per Zoom*

La 19-an **Kion ni legas** – Milan Kolka, Občanský klub, Hybešova 65a

La 25-an **Universala Kongreso 2022 en Montrealo** – Petr Chrdle, *rete per Skajpo* (atentu, escepte la prelego okazos jam marde)

Mi petas vin, ke vi jam primensu vian proponon por aŭtuna programo. Ju pli da homoj kontribuos, des pli bunta nia programo estos.



Ni rekomendas

- la 11-an – 13-an de novembro **120-a datreveno de la praga e-klubo**, Praha



Pozvánky Vám chodí, protože jste členy klubu nebo příznivci, kteří souhlasili se zasíláním pozvánek. Souhlas můžete kdykoliv odvolat, stačí to napsat v odpovědi na tento e-mail.

Program klubu můžete též zjistit:

- na našich webových stránkách (<https://www.esperantobrna.cz/index.php/eo/aprogramo>),
- na naší stránce na Facebooku (<https://www.facebook.com/esperantobrna/>)
- a na Eventa servo (https://eventaservo.org/o/EO_Brna)

Milan Kolka
prezidanto